Paul Gerhardt,

# Transdonu vian vojon

*tradukita de Hendrik Arie de Hoog*

1. Transdonu vian vojon,
la zorgojn de la kor',
turmentojn aŭ malĝojon
al Dio, la Sinjor'!
La mondon Li ja movas.
La vent' obias Lin,
por nub' Li vojon trovas;
ĉu Li ne gvidus vin?

2. Al l' Eternulo fidu
en pen' aŭ en esper';
Li viajn agojn gvidu
kaj certas la prosper'.
Se homo nur lamentas
pri sia sort' sen fin',
lin Dio ne atentas,
nur preg' atingas Lin.

3. ................................
...................................
...................................
...................................
...................................
...................................
...................................
...................................

4. La vojon vian ame
elektas Li; tra bon'
aŭ tra suferoj same.
Li gvidos laŭ bezon'.
Nenio Lin retenas,
ĉar venkas Lia grac'.
Li siajn idojn benas
per amo, fido, pac'.

. . .

5. ................................
...................................
...................................
...................................
...................................
...................................
...................................
...................................

6. Kaj fidu Lin, animo,
ĉar vin ja tiros Li,
eĉ el plej granda timo
kaj ĉiam miros vi,
se krede vi atendos,
ĝis Li en sia hor'
por via help' descendos
kaj brilo Lia glor'.

7. ................................
...................................
...................................
...................................
...................................
...................................
...................................
...................................

8. Kaj kredu, ke Li reĝas
eĉ kontraŭ falsa ŝajn'.
Se vi persiste preĝas,
Li helpos iel ajn.
Ne kredu, ke vi devos
droniĝi en labor'
senfina; ne, Li levos
vin al la patra kor'.

9. ................................
...................................
...................................
...................................
...................................
...................................
...................................
...................................

. . .

10. ................................
...................................
...................................
...................................
...................................
...................................
...................................
...................................

11. ................................
...................................
...................................
...................................
...................................
...................................
...................................
...................................

12. Li faros vian vojon
plej luma en la fin',
preparos por vi ĝojon
kaj feliĉigos vin.
Jam sonas laŭdo-psalmoj,
jam vokas vin la cel',
jam logas vin la palmoj,
ĉe l' pordo de l' ĉiel'.

*Traduko de la Germana poemo "Befiehl du deine Wege" de* Paul Gerhardt *(∗1607-03-12 – †1676-05-27) en Esperanton de* Hendrik Arie de Hoog *(∗1910 – †2001) en 1954.*

*Arg-546-1100 (2013-07-17 21:48:20)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas en la ekumena eklezia kant-libro "Adoru", n-ro 744. Pri la tradukinto, la nederlanda esperantisto H. A. de Hoog, estas notita io en la vikipedia retejo http://eo.wikipedia.org/wiki/Hendrik_Arie_de_Hoog.*